

Trevor Steele

**Konvinka
kamuflaĵo**

Senpaga provlibro!

Konvinka kamuflažo

Konvinka kamuflaĵo

Aŭtobiografio de

Trevor Steele

Konvinka kamuflaĵo

**Eldono de Flandra
Esperanto-Ligo**

n-ro 37 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Al mia edzino Katja
kaj mia filo David
al miaj gepatroj kaj gefratoj
al miaj geamikoj kaj gekonatoj
kaj ĉiuj, kiuj akompanis/as/os min
survoje sur tiu ĉi bela, misuzata
planedo.

KONVINKA KAMUFLAĴO

Antaŭ ol ekvojaĝi

Estas diversaj kialoj por ne verki aŭtobiografion.

Ĉu mia vivo vere estas sufiĉe interesa, ke aliaj legu pri ĝi, aŭ ĉu estas ago de vanteco supozi, ke iu ajn alia volus legi pri miaj spertoj? Parencoj kulpas: ili ofte provis persvadi min surpaperigi miajn aventurojn. Do oni kulpigu ilin, ne min. Aliflanke, mi ja ŝatas verki. Aliaj homoj talente kantas, dancas, pentras, riparas motoron, matematikumas, scias absolute ĉion pri noktaj ranoj en la malsupra Amazonio,

dum mi, se mi havas ion montrindan, temas nur pri vortoj.

Dua kialo por ne skribi pri la propra vivo estas, ke mi supozas, ke tiu ĉi vivo ne estas tuj ĉesonta. Kvankam mi ĉijare iĝis sepdektrijara, mi sentas, ke estas multe tro frue por pensi pri propra nekrologo. La sankta libro de la antikvaj izraelidoj aljuĝis al la homo “jarojn trioble dudek kaj dek”, kaj laŭ tiu mezuro mi jam ricevis pli ol mian porcion. Sed nuntempe ni vivas pli longe ol la homoj de antaŭ tri jarmiloj, kaj mi antaŭĝuas ankoraŭ du jardekojn, dum kiuj multo okazos. Do tiu ĉi teksto estas nur provizora raporto.

Tria kialo kontraŭ aŭtobiografiado estas eble specifa por homo, kiu ofte uzis siajn proprajn spertojn kaj observojn en fikcia teksto, “miksante la kartojn”. Foje mi devas pene distingi por mi mem inter tio, kio fakte okazis, kaj tio, kion mi verkis. Kaj povas esti, ke legintoj de miaj fikciaĵoj pensos pri

partoj de tiu ĉi verko: ha, tion – aŭ ion tre similan – mi jam legis! Mi povas nur esperi, ke la okazaĵoj estas sufiĉe interesaj, ke oni respertu ilin – ofte en iom ŝanĝita formo.

Unu pozitiva kialo por verki pri mi mem estas iom megalomania, sed jen ĝi: se Esperanto ankoraŭ vivos post kvindek jaroj – kaj ni ĉiuj esperas tion – povos esti, ke iu literaturisto volos scii iom pri la vivo de verkistoj de la malfrua dudeka kaj frua dudekunua jarcentoj, kaj eble mia vivo estos esplorata. Se jes, jen mia versio, eble mankohava, sed ja mia.

Aktuale mi loĝas en la plej trankvila el la aŭstraliaj ĉefurboj. La ĉiutaga vivo en folioriĉa antaŭurbo de Adelajdo ne

stimulas – de ekstere – grandajn krizojn aŭ emociojn. Foje mi deziras, ke estu pli da dramo, pli klara sento, ke mi faras ion por plibonigi min aŭ la mondon. Se foje mi bedaŭras la rutinecon de mia komforta vivo, mi devas konfesi, ke ĝi havas siajn avantaĝojn, kaj mi tre amas la virinon, kun kiu mi vivas. Sennombraj homoj rigardus mian vivon idilia kompare kun la propra lukto en danĝero kaj malpuraĵoj por akiri la plej rudimentajn vivnecesajn.

Retrospekte mi sentas, ke okazis ne malmulto dum mia vivo. Estis kelkaj realigitaj projektoj, iom da dramo, iom da danĝero, plenumitaj kaj neplenumitaj amoj, iom da lernado, kaj multe da amuzaj epizodoj. Sed ĉu tiuj eventoj difinas tion, kio mi esence estas? Mi povus aldoni la nomojn de miaj edzinoj, kaj de miaj gepatroj kaj gefratoj, mian pasportnumeron, mian impost-dosieran numeron, mian telefon-numeron, stratan kaj

elektronikan adresojn, kaj cent aliajn detalojn. Sed ĉu tiuj aferoj difinas la kernan fundamenton de tio, kio aŭ kiu mi estas? Pli kaj pli mi emas rigardi tiujn detalojn kiel kamuflaĵon, maskojn dumtempe portatajn de iu estulo, kiu ne estas plene difinita de ili.

Tamen la kamuflaĵo devas havi sian propran signifon, kaj aktuale tiuj detaloj estas ĉio, kion mi povas diri pri mi. Do mi nun skribos, kvazaŭ mi ne suspektus, ke temas pri maskoj. La kamuflaĵo estas ja konvinka.

La ĉeno de miaj antaŭuloj estas same longa kiel la historio de la homa specio, sed mi havas nenian ideon pri mia familia arbo antaŭ la mezo de la deknaŭa jarcento. Mi konfesu, ke

malgraŭ mia intereso pri historiaj okazaĵoj, neniam mi sentis fortan deziron penetri la nebulon ĉirkaŭ miaj biologiaj generintoj. Sed en ĉiu generacio okazis tiu miraklo de reproduktado. Ĉu estas neniu telos, neniu celo en la tuta evoluo de la homaro kaj la Universo krom tiu reproduktado?

Tre frue mi sentis min fremdulo ĉi tie. Mi estis eble trijara, kiam venis unu el tiuj pensoj, kiujn oni neniam forgesos: ĉi tiu ne estas mia vera loko, mi estas nur vizitanto ĉi tie. Mi havis nenian ideon, kie mia “vera loko” povus esti, sed la sento esti portempa turisto brulis en mia knabeta menso. Kaj sekvis alia demando: do kial mi estas ĉi tie? Kion signifas tiu ĉi vivo? Tiu demando de naiva infano ofte leviĝis dum mia vivo, kaj mi supozas, ke ĉiu homo spertas momentojn, kiam la demando iĝas akuta.

Krom pri la demando, kion mi faras ĉi tie, mi ofte cerbumis pri tio, kial tiom da homoj havas vivon kiu, vidata de ekstere, estas tiel mizera: la invalidoj, malliberuloj, malriĉuloj, persekutatoj, subprematoj, senhejmuloj, senlaboruloj, mense malsanuloj. Kial tiom da homoj suferas pro tio, ke ili naskiĝis en ŝajne malĝusta loko? Kion signifas ilia vivo?



Mia patro Herbert (Bert) Steele.

Origino

Mia antaŭnaskiĝa nomo estis Rosemarie. Mia patro venis el sia laborloko en eŭkalipt-arbaro al la hospitalo en Mareeba, norda Kvinslando, por saluti sian ĵus aperintan filinon. Kaj Panjo kaj Paĉjo ial konvinkiĝis, ke mi estos knabino, do mia alveno necesigis cerbumadon. Panjo proponis Trevor, sed ne malkaŝis dum ses monatoj sian motivon. Ŝi estis inspirita de eleganta angla filmaktoro Trevor Howard, kiu tre imponis al ŝi du semajnojn antaŭ la naskiĝo. Se Paĉjo tion sciintus, antaŭ ol la nomo fiksiĝis, li eble malakceptintus ĝin pro ĵaluzo.

Sed miaj gepatroj aldonis la nomon de mia patrina avo, William, kiel mian unuan. Kvankam mi neniam uzas William kaj ne reagis en hospitala

atendejo, kiam flegistino vokas tiun nomon, oficiale mi estas William. Miaj gepatroj estis almenaŭ konsekvencaj en sia klopodo konfuzi la gefilojn. Glenda Joan estas nomata Joan, kaj Robert Clive estis – jes, vi divenis, Clive.

Ege frue en la vivo mi havis iluziojn pri mia staturo. Eble mi aĝis dek ok monatojn, kiam iun tagon mi staris en nia korto kaj kliniĝis, ke superfluganta aviadilo ne koliziu kun mia kapo. Tiu timige ŝrikanta monstro estis usona maŝino, kiu deteriĝis en Mareeba por iri bombi japanajn ŝipojn sur la Korala Maro.

Al tiu konflikto, la Dua Mondmilito, mi ŝuldas preskaŭ idilian komencon de la vivo. Mia patro volis, kiel preskaŭ ĉiuj viroj de tiu generacio, soldatiĝi kaj partopreni en la ĉefa evento de la epoko. Sed la registaro informis lin, ke lia metio estas “milite grava”. Li estis arbofalgisto, kaj la registaro ordonis al li resti ĉe sia laboro kaj provizi al ĝi

arbotrunkojn uzotajn por fari pontojn en Nova Gvineo kaj aliloke. La Japana Imperia Armeo impetis suden, kaj ĉiuj timis.

Sekve miaj gepatroj, mia unua fratino Carol, kaj mi pasigis la jarojn de la milito, kiam la cetera mondo sin disŝiradis, en belaj arbaroj, kie Paĉjo rikoltis arbojn. Ni loĝis en tendo apud bela rivereto, niaj najbaroj estis birdoj kaj bestetoj. Kvankam mi loĝis dum granda parto de mia vivo en grandaj urboj, iu parto de mi ankoraŭ kredas, ke estas nature vivi en arbaro. Mi sentas preskaŭ fizikan doloron, vidante fotojn de arbarskeletoj, kiuj malbeligas tiom de la surfaco de nia planedo.



Mia patrino Dorothy (Dorrie) Smallwood.

Mia patro estis vere homo de la
deknaŭa jarcento. Li ĉiam loĝis en

vilaĝeto aŭ vera “boŝo”, kaj li mirinde majstris la arton uzi hakilon por faligi arbojn ĝuste tien, kien li deziris. Per kelkaj hakilbatoj li povis decidi, ĉu arbo estas “solida” aŭ havas kavon meze. Aliflanke li malamis maŝinsegilojn – iu ajn idioto povas faligi arbon per tiuj aĉaĵoj – kaj ĝenerale maŝinojn. Dum multaj jaroj mi akompanis lin – ne ĉiam volonte – dum ekspedicioj por ĉasi kanguruojn. Li vendis la peltojn al fabriko en Rockhampton, kie oni produktis mi-ne-scias-kion, kaj la viandon ni ofte manĝis, almenaŭ la voston. Dum tiuj ekspedicioj trans tre malebenajn pejzaĝojn, kies montetoj ofte tre similis unu la aliajn, dekojn da kilometrojn for de ĉiu homa loĝejo aŭ aŭtovojo, tre facile oni perdus sian orientiĝon. Mia patro simple sciis ekzakte, kie li estas, kaj neniam mi vidis lin uzi montosupron aŭ arbon aŭ alian topografiaĵon kiel orientilon. Paĉjo fiere nomis sin “vera boŝulo”. “Perdiĝi” en arbaro estis por li granda hontaĵo, kaj mi kredas, ke neniam en la vivo li suferis

tiun humiliĝon. En postaj jaroj, kiam eĉ li trovis tre pene transmarŝi tiujn malfacilajn terenojn, li iris je ĉiu ŝanco kapti fiŝojn en lokoj kiel eble plej for de homaj domoj aŭ bienoj. Ja ankoraŭ tiu parto de Aŭstralio estas ege maldense priloĝata. Por Paĉjo arbaro estis speco de adorejo, kien li iris, se li havis problemon – kaj se li ne havis problemon.

Nia Panjo estis de tute alia speco. Knabino el familio de kvar fratinoj, ĉiuj muzikemaj kaj piaj, eksa flegistino, ŝi troviĝis en tute fremda mondo en tiuj arbaroj, sed ĉar ŝi estis forte enamiĝinta al “la plej bela viro de la mondo”, ŝi sin submetis al tiu aventura vivo.

La milito finiĝis en 1945 kaj ni emerĝis el la arbaroj kaj ekloĝis en vilaĝeto nomata Ravenshoe, kie Paĉjo establis segejon por provizi ŝpalojn por fervojoj. La aŭstralia registaro ne forgesis la grandan timon, ke la nordo de la kontinento estas preskaŭ senhoma

kaj do nedefendebila kontraŭ malamikoj. La politiko kaj de la registaro kaj de la opoziciaj partioj estis “pliiĝu aŭ pereu”. Do necesis konstrui fervojojn por ebligi establون de vilaĝoj, poste urboj en tiuj ankoraŭ senhomaj regionoj. “Infrastrukturo” estis ofta termino. Mia patro do povis per la liverado de ŝpaloj enspezi bone dum multaj jaroj, li kiu apartenis al la generacio suferinta en la Granda Depresio.

En tiu medio oni serĉis la signifon de la vivo ĉe eklezioj. Se vi suferis doloron, vi iris al kuracisto. Se via aŭto paneis, vi parolis kun meĥanikisto. Kaj se vi cerbumis pri la plej profundaj demandoj, vi iris al la specialistoj, la pastroj.

Mi devas aldoni, ke en la etaj vilaĝoj de norda Kvinslando la eklezioj ĝuis pli

altan estimon ol inter la urbaj intelektuloj. Se pastro O'Shaunessy diris ion, ĝi estis nepre pripensinda, ĉar li havis rektan kontakton kun la Ĉiopotenculo.



Mi, unujara, kun mia patro.

La nomo de tiu pastro sendube
perfidas la konfesion, al kiu ni apartenis

en tiuj jaroj. Kiel preskaŭ ĉiuj neaborigenaj aŭstralianoj de tiu tempo, mi havis eŭropajn antaŭulojn, kiuj kunportis el la malnova kontinento siajn religiajn etikedojn. Fakte, kvankam mi estis duone irlanda, duone angla ambaŭflanke, la ŝancoj, ke mi estos katoliko, estis nur unu el kvar.

Mia patrino devenis el la sudirlanda graflando Waterford kaj ŝia rezoluteco por konservi sian katolikecon eble forviŝis ŝian pekon, ke ŝi edziniĝis al protestanto, eĉ framasono. Bonŝance la framasono estis tolerema pri religiaj diferencoj, kaj mia Panjo kreskis kiel cent-procenta katolikino. Por ŝi la Eklezio havis la respondon al ĉiu ajn demando.

Mia patra avo estis forte kontraŭklerikala. Li devenis el norda Irlando kaj volis absolute ne rilati al tiuj absurdaj kredoj, kiuj igis, ke homoj mortigu alikredantojn. Lia angladevena edzino estis teorie anglikana aŭ

metodista, ŝi mem ne estis certa. Do mia patro estis hereda malamanto de eklezioj, sed enamiĝis al katolikino, kies volo, sur tiu sola kampo, estis pli forta ol lia mokado.

Dum la milito ni estis tro for de preĝejoj, ke Panjo ĉeestu dimanĉajn mesojn. Paĉjo evidente esperis, ke pro tio ŝi ne plu estos “religia”. Sed kiam ni ekloĝis tri kilometrojn de Ravenshoe, ŝi petis lin, sabaton posttagmeze, veturigi ŝin kaj la tri infanojn al la morgaŭa meso. Paĉjo rifuzis. Dimanĉon matene li foriris iom en la arbaron apud nia domo, ke ŝi ne povu ĝeni lin per la sama demando. Panjo rezolute vestis nin kaj metis nin en la malnovan Dodge-aŭton kaj provis memori la rudimentojn de veturigado, kiujn ŝi iam lernis de sia patro. Ŝi sukcesis ekfunkciigi la veturilon kaj ĝi saltis antaŭen tre rapide. Panjo bremsis, akcelis, bremsis, akcelis, kaj la suferanta aŭto saltis intermite antaŭen, je mia granda amuziĝo. Paĉjo subite komprenis, kio okazas, kaj kuris el la

arbaro, sed ne povis haltigi la progreson de tiu strange baŭmanta ĉevalo. Panjo iel sukcesis veturigi senakcidente ĝis la preĝejo kaj preskaŭ koliziis kun la preĝeja barilo. Tremetante ŝi kondukis nin en la sanktan domon. Mi nenion komprenis de la strangaj vortoj de la pastro (en la latina), sed memoras, ke la incenso forte odoris.



La baza lernejo en Ravenshoe (mi la antaŭlasta knabo).

Kiam la meso finiĝis, ni eliris al la aŭto. Tie staris Paĉjo, marŝinte de nia domo. Li devis cedi. Kaj ekde tiam li veturigis nin dimanĉe al la preĝejo, kaj sidis ekstere, legante sport-ĵurnalon kun multaj bildoj.

Ĉiuj sep infanoj edukiĝis katolike. Sed kiam ni transloĝiĝis al Ravenshoe, ne estis katolika lernejo tie. Mia fratino Carol kaj mi iris al la ŝtata lernejo. Kiam, iom poste, la ekspansia eklezio konstruigis monaĥejon kaj lernejon en nia vilaĝo, la paroĥestro vizitis por persvadi miajn gepatrojn sendi nin al la ĝustakonfesia edukejo. Panjo kompreneble jesis, Paĉjo forte kontraŭis. Ili atingis kompromison: Trevor restos en la ŝtata lernejo, la ceteraj povos iri al la nova. Kaj tiel estis. Carol, Joan, Clive, Don, Phil, kaj Vic iĝis “plenaj” katolikoj. La knaboj ĉiuj servis kiel “altarknaboj” kaj portis la antikvajn vestojn, sed mi ne – iom ironie en retrospekto.



Familia foto: Sidantaj: Clive, gepatroj,
Trevor.

Starantaj: Victor, Phillip, Don, Joan,
Carol.

Oni sendis min en la lernejon ankoraŭ kvarjaran. Ial oni supozis, ke frua komenco de lernado estas avantaĝa, sed miakaze tio tute ne pravis. En tiu aĝo mi estis revema knabeto ne interesata pri tio, kion ni devis lerni. Mi estis dum tuta jaro ĉiam

la lasta en la klaso ĉe la ĉiumonataj ekzamenoj. Sed iam dum la dua jaro mi subite vekigis kaj diris al mi mem: “Mi povas tion.” La dudekdua el dudek du infanoj en la pasinta ekzameno, mi igis la dekunua unu monaton poste, tiam la dua, kaj poste ĉiam la unua. La forta egoo, kiu rezultis, restis kun mi dum la tuta vivo.

Kontraste al la ceteraj infanoj en la ŝtata lernejo, mi neniam pugnobatis la infanojn de la katolika – finfine, miaj gefratoj estis inter ili. Sed mi pretis ĝismorte batali, se iu asertis, ke mi amas knabinon. Knabinoj certe ne estis miaj plej ŝatataj homoj ... ĝis mi mem aĝis dekunu jara, kiam subite knabinoj igis tiel ... malsamaj ... tiel ... iel dezirindaj.

Sporto ege gravis por mia patro, kaj do ankaŭ por mi kaj la kvar fratoj (malpli por la knabinoj). La apogeo de la vivo de mia patro probable estis la kelkaj horoj, kiam li reprezentis Nordan

Kvinslandon kontraŭ la turneantaj angloj en 1932. Kompreneble, ĉar ni loĝis en la nordo de la provinco, la sporto estis liga rugbio. Panjo ne ŝatis tian futbalon aŭ iun ajn sporton, kiu povus kaŭzi vundojn. En 1946, kiam la milito ne plu dominis la mensojn, oni reprenis “normalajn vivritmojn”, kaj tio signifis restarigon de futbalkonkursoj inter la diversaj vilaĝoj de nia regiono. Mia patro, la antaŭmilita stelulo, iĝis la trejnanto kaj teamestro de Ravenshoe, sed 37-jarulo ne plu povas same rapide kuri kiel 23-jarulo. Panjo sentis malŝargiĝon, kiam ankaŭ Paĉjo decidis ne plu ludi.

Tiutempe ne estis duagradaj ŝtataj lernejoj en niaj vilaĝoj. Sekve tre malmultaj lokaj infanoj daŭrigis sian lernadon post la naŭa jaro. Tiuj kiuj

volis, devis loĝi en internulejo aŭ en Herberton aŭ Cairns – kaj tiuj estis katolikaj. Paĉjo nepre volis, ke liaj infanoj estu bone edukitaj, do li sendis nin knabojn al la Kolegio de Sankta Aŭgusteno (KSA) en Cairns. Ni iris tien per trajno, kaj la veturo daŭris multajn horojn, trans eble la plej interesajn pejzaĝojn en Aŭstralio. Montara ĉeno laŭ la marbordo preskaŭ atingas la oceanon mem, kaj ni devis veturi tra dekoj da tuneloj. Parte la montoflankoj estas vertikalaj, kaj donas grandiozan vidon al la mallarĝa marborda ebenaĵo kaj la sukerkankampoj. En unu loko, kie la trajno haltis dum kelkaj minutoj, oni staris kaj kontemplis la furioze plonĝantan akvofalon Barron. Bedaŭrinde tiu fervoja linio estis detruita de la registaro de Bjelke-Petersen en la 1970-aj jaroj, kaj oni transdonis riĉan komercon al grandaj kamionposedaj kompanioj. Miaj fratinoj Carol kaj Joan iris al la porknabina internulejo Monto de Sankta Bernardo en Herberton.

En KSA mi forte internigis la doktrinon, ke nur ni katolikoj apartenas al la vera eklezio. Ni priloĝis die iluminatan kastelon, dum la ceteraj homoj fuŝpalpis sian vojon en ekstera mallumo.

Estis tamen ioma skizofrenio en nia sinteno al eksteruloj. Tiutempe grandega plimulto de la katolika klerikaro devenis el Irlando. La irlandaj katolikoj ankoraŭ vidis sin mem kiel batalantojn kontraŭ la nombre superaj anglaj protestantoj. Do ni estis malplimulto kun la tria etoso de la persekutatoj kaj maltoleremo al eksteruloj kaj tiuj, kiuj perfidis la tribon. Samtempe nia plej alta lojaleco estis al Romo kaj ĝiaj vastaj homamasoj, la plej granda fido-komunumo en la mondo, kaj la sola die aprobata. Do ĉu ni estis malplimulto aŭ plimulto?

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.

Notoj

1 Libro de la romanaj martiroj

2 Kaj kun via spirito

3 Kaj ne konduku nin en tenton

4 Sed liberigu nin de la malbono

5 Ĝi estas naŭzoveka

6 La anglaj vortoj estis
PIECEMAKER kaj PEACEMAKER.

7 En la angla, “educated Australian”
kaj “broad Australian”.

8 En la germana, kotzen estas
vulgara vorto por vomo.

9 Angle: eccentric

10 Iom fuŝa angla: Kion faras la plej
bona instruisto de la mondo?

[11](#) Mi verkis artikolon en Beletra Almanako 3 (septembro 2008) pri tiu temo.

Kolofono

Titolo Konvinka kamuflaĵo
Aŭtoro Trevor Steele
Kovrilo Julia Litvinova
ISBN de la papera eldono 978-90-
77066-50-8
UDK 92=892
NUR 321
Leĝa depono de la papera eldono
D/2014/2924/1
IBAN 14-1-340-215

Eldonis Flandra Esperanto-Ligo
Lange Beeldekensstraat 169 - 2060
Antverpeno
www.retbutiko.be
© 2014 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi e-libro estas nur parta eldono
por ekkonigi la verkon. La tutan libron vi
povas akiri de www.retbutiko.be.